N-ro 1 - 2020

Martinus Institut

Kosmos

La Kosmologio de Martinus

Martinus:
Martinus pri Esperanto en 1939

Martinus:
La morto kaj la pensomondo de la homoj

Martinus:
La vojo al la paco

Ole Therkelsen:
La sekreto de la piramido (2:3)

UEA:
Salutvortoj

Martinus:
Mencioj de Esperanto en Granda Kurso

Konsilio de la Instituto:
Pri Esperanto kiel internacia lingvo

Ole Therkelsen:
Perfekta internacia lingvo

Demando kaj respondo

© Martinus Institut 1981 Reg. 14

La kosma spiralciklo 1

Esperanto

Martinus pri Esperanto en Kosmos 1939

En la jaro 1932 fondiĝis la Martinus-Instituo per la eldono de la unua volumo de Livets Bog (La Libro de la Vivo). En la jaro 1933 eldoniĝis Kosmos, la revuo de la Martinus-Instituto. Jam en Kosmos n-ro 1, 1939 Martinus skribis pri Esperanto en dana lingvo.

"Kiel la legantoj eble jam vidis, la revuo *Kosmos* enhavas kolumnon kun teksto en la internacia komuna lingvo "Esperanto". Ĉar multaj danoj uzas tiun lingvon kaj havas vastajn kunligojn kun esperantistoj en diversaj landoj, ni tiel malfermas fenestron al la granda mondo.

Por ne malfavori tiujn, kiuj ne komprenas Esperanton, la artikolo ankaŭ aperas en la revuo en dana lingvo. Ambaŭ versioj aperas en la revuo tiel, ke sendamaĝe por aliaj tekstoj oni povas eltondi la artikolon por sendi ĝin al fremdaj esperantistoj.

Esperanto estas planita lingvo, konstruita de la pola kuracisto L. Zamenhof (1859-1917), kiu publikigis la lingvon sub la kaŝnomo Dr. Esperanto (esperanta homo) por tiel krei internacian helplingvon. Rilate al aliaj similaj lingvoj Esperanto senkonteste havas grandajn avantaĝojn, kaj ŝajne estas la sola planita lingvo, kiu pruvis sian taŭgecon (i.a. en diversaj kongresoj).

Esperanto forte evoluadis, sed iom stagnis dum la unua mondmilito. Sed nun ĝi denove forte evoluas, kaj certe pro sia granda simpleco kaj facileco ĝi certe gajnos grandan lokon en la internacia evoluo.

En tia internacia laboro, kiu prezentiĝas pere de "Livets Bog" kaj la revuo "Kosmos", Esperanto ŝajne povas esti de grandega uzo kiel portempa ponto inter la dana lingvo kaj la fremdaj lingvoj, kiu estas parolita de eksterlandaj interesatoj de mia laboro. Pere de Esperanto multe da interesatoj tra la mondo senprokaste povos kontaktiĝi kun mia laboro, ĉar ili ne bezonas atendi la estontan tradukon en la grandajn mondlingvojn.

Esperanto tiel estas ponto inter la dana kaj ĉiuj fremdaj lingvoj. La ĉino kaj ruso, la hindo kaj japano, same kiel ĉiu unuopa eŭropano pere de Esperanto same facile trovos vojon al kompreno al tio, kion ni deziras skribi al ili en nia revuo. Tio tiel estas la unua eta klopodo serĉi atenton dise en la granda mondo.

Per tio komenciĝis nova suplemento al nia internacia laboro. Se la intereso estas sufiĉe granda, ni starigos Esperanto-kurson en la kadroj de la instituto. Povos signifi treege multe por la disvastigo de mia verko, se kiel eble plej multaj de ĝiaj amikoj lernos Esperanton." (*Kosmos* n-ro 1/1939, p. 1-2).

Traduko Ole Therkelsen

Martinus pri internacia mondlingvo: Bonvolu vidi paĝon 18, LEM 2, par. 26.25 "Internacia mondlingvo"

La morto kaj la penso-mondo de la homoj

de Martinus


M0160

1. Neniu estulo povas neniiĝi; la morto estas naskiĝo en alian mondon

Se estas io, kio povas plenigi la konscion de homoj per timo kaj teruro, tio estas la penso pri la morto. La penso ke oni neniiĝus prezentiĝas al la plej multaj homoj kiel io horora kaj terura. Estas nenio stranga en tio, ĉar "vivi" ja estas la natura kaj necesa stato por "la viva estulo", kaj "morti" estas io nenatura kaj malkongrua, al kio la estulo reagas. "Sed ĉu ĉiam tiel estas?", eble kelkaj homoj volas kontraŭargumenti, atentigante ke ekzistas homoj kiuj mortigas sin mem kaj maljunuloj kiuj ja povas sopiri al la morto. Sed neniu el tiuj du kategorioj efektive sopiras morti. La unue menciitaj, la sinmortigantoj, sopiras elturniĝi el certa malagrabla situacio en kiu ili troviĝas, kaj kiu mallumigas ilian konscion, tiel ke ili ne povas vidi alian solvon ol "preni sian vivon", kiel oni diras. Ili ne deziras morti, ili nur klopodas eliri el la koncerna situacio, kiu okupas ĉiujn iliajn pensojn kaj plenigas ilian menson per mallumo. Ili estas kiel homoj, kiuj tenas etan objekton antaŭ siaj okuloj, tiel ke ĝi baras al ili ĉiujn radiojn de la suno, kaj konkludas ke la sunlumo estas for por ĉiam. Maljunaj homoj ankaŭ ne sopiras morti; ankaŭ ili sopiras liberiĝi de certa situacio, nome troviĝi en korpo, kiu ne plu kapablas servi al ili kiel valora ilo por perceptado kaj manifestado en la fizika mondo. Sekve, kaj la sinmortigantoj kaj la maljunuloj, kiuj estas "sataj de vivo", sopiras for de sia nuna stato, sed ili ne sopiras morti. Neniu sopiras morti, kaj tio ke kelkaj homoj kredas ke oni povas morti en la signifo ke oni neniiĝus kaj ne plu povus sperti kaj krei, estas la plej granda superstiĉo, kiu entute ekzistas. Nenia tia morto ekzistas. La sola morto kiu ekzistas, estas tiu stato, en kiu la homoj troviĝas, kiam ili kredas je la morto kaj envolviĝas en materiisman pensmanieron, kiu baziĝas je egoismo kaj "la rajto de la plej forta". Tiu stato estas "la regno de la mortintoj", kaj temas pri fizika stato, kvankam ĝi ankaŭ povas etendiĝi ĝis stato travivebla dum la unua tempo post kiam homo forlasis sian fizikan korpon. Tiukaze, ĝi fariĝas speco de "purgatoria travivaĵo", kiu ne estu interpretata kiel puno de kolera dio, sed kiu estas natura konsekvenco de la pensmaniero kaj tuta vivsinteno de la estulo. Mi tamen ne mencias tion ĉi por timigi homojn kaj kreskigi la timon de la morto, kiun homoj jam sentas. Kontraŭe, mi volas emfazi ke tio, kion homoj kutime nomas "la morto", estas komenco de nova vivo, kaj do efektive temas pri "naskiĝo" kaj same kiel naskiĝo de homa infano kutime estas akompanata de ĝojo kaj feliĉo, devus esti, kaj estontece ankaŭ estos ĝojo kaj feliĉo kiam homo forlasas la fizikan mondon kaj naskiĝas en alian mondon.

2. Por superi la mortotimon, la homoj devas ekkoni la leĝojn de la vivo

Sed kiel eblas forigi la superstiĉan kredon je la morto el la menso de la homoj?

Tio nur eblas per tio ke la kompreno pri la vivo kaj ties leĝoj kreskas en la konscio de tiuj samaj homoj. La teraj homoj devas veni al kompreno, ke la vivo ne estas ligita al la fizika materio, nek dependas de ĝi, sed ke kontraŭe estas la materio kiu kombiniĝas al certaj formoj fare de tio kio estas viva, kaj dependas de ties trafluo. Kiam tiu vivanta "io" ne plu trafluas la organismon de homo, ĝi fariĝas kadavro, kiu dum ankoraŭ mallonga tempo plu retenos la formon kiun al ĝi donis la viva io, sed kiu baldaŭ dissolviĝos, tiel ke restas nur la skeleto. Ne surprize, la skeleto ja fariĝis simbolo por morto kaj neniiĝo kaj fariĝis al la homoj timiga hororaĵo. La kosma vero pri la skeleto tamen estas nur tio, ke ĝi estas brila stativo, kiu portas kaj protektas la homan organismon; teknika majstraĵo, kies egalaĵo la homoj ne povas konstrui, eĉ per sia teknika genieco.

3. Tio, kion ni nomas vivo estas vivesprimoj de vivaj estuloj

Kio do estas tiu "viva io", kies ĉeesto igas organismon viva, kaj kies retiriĝo igas ĝin kadavro? Tio estas la "viva estulo" mem. Ĉio, kion ni nomas vivo, estas vivesprimoj de vivaj estuloj, kaj kiam la tiel nomata morto okazas, tio nur signifas ke la viva estulo ĉesas sin manifesti aŭ esprimi per certa materikombino, kiun ĝi estas uzata kiel ilon dum pli aŭ malpli longa tempo. La homoj vivas en la granda miskompreno, ke la viva estulo identas kun fizika organismo, sed ili iam venos al la kompreno, ke fizika organismo estas nura ilo por viva estulo, kaj eĉ ilo kiu pro diversaj kialoj kaj je certaj intervaloj estas ŝanĝita, kaj ke tiam la viva estulo spertas kaj manifestas sin per aliaj organismoj, kiuj ne estas fizikaj, ĝis kiam ĝi refoje, pere de nova fizika organismo, fariĝas kapabla travivi novan vivon en la fizika mondo.

4. La triunua principo ekzistas malantaŭ la tuta universo kiel viva estulo, same kiel ĝi ekzistas malantaŭ ĉiu unuopa viva estulo en la universo

En miaj kosmaj analizoj en mia ĉefverko "Livets Bog" mi analizas la tri eternajn principojn, kiuj ekzistas malantaŭ la tuta universo kiel viva estulo, kaj montris, ke la samaj principoj ekzistas malantaŭ ĉiuj vivaj estuloj en la universo. La homo, same kiel ĉiuj aliaj estuloj, vere estas kreita "laŭ la bildo de Dio, simila al li", kiel estas skribite en la Biblio, kaj tiel estas, ĉar ili per tiuj tri principoj, kiuj efektive estas unu principo, la triunua principo, estas unu kun la eterna Patro aŭ la universala estulo, ene de kiu ili eterne "vivas, moviĝas kaj ekzistas". Malantaŭ la vivo de la universo ekzistas la eterna kreanto kun sia kreopovo, kiu estas same eterna, kaj la eterna rezulto de la kreanto kaj la kreopovo, nome la kreaĵo, estas eterna en la senco, ke ĝi estas eterne ŝanĝebla. Krei ne signifas igi ion ekesti el nenio, tio estas maleblaĵo. Krei signifas transformi ion el unu stato en alian, kaj malantaŭ tiu statoŝanĝo troviĝas la leĝo pri kaŭzo kaj efiko kaj la eterna ciklo de la vivo. La fizika scienco komencas esti surspure al certaj universalaj veroj, sed ĝia materiisma pensmaniero malhelpas al ĝi veni pluen. Kiel dirite, tio ne estas kritiko, ĉar estas ja ĝuste la tasko de la materia scienco eltrovi la ecojn kaj strukturon de la fizika materio. Sed tiu scienco kondukas rekte al la limo de alia scienco, nome la spirita scienco, kies tasko estas rakonti al la homoj pri la spiritaj aŭ radiformaj materioj, kiuj formas skalon kiu kondukas de la pli delikataj fizikaj materioj ĝis la krudaj spiritaj aŭ psikaj materioj, kaj pluen ĝis ĉiam pli kaj pli delikataj spiritaj aŭ psikaj materioj. La laboro de la fizika scienco pri radioj kaj ondoj, pri elektro kaj magnetismo, montris al

ne malmulte da homoj, kiuj sin liberigis de rutina pensado kaj materiismaj antaŭjuĝoj, kiom grandaj ebloj aperos antaŭ la homoj en la estonteco esplori ĝis nun nekonatajn regionojn de la vivo kaj ties leĝojn. La problemo pri la morto estas unu el la aferoj, kiuj per tiaj esplorado kaj novaj malkovroj, ĉesos esti problemo por la homoj, ĉar ili ekvidos ke la tiel nomata morto estas nur unu el la transformaj procesoj, kiuj sur la nuna evoluŝtupo de la homoj estas necesa kaj logika, same kiel estas necese kaj logike por certaj insektoj sin transformi de raŭpo al krizalido kaj al papilio.

5. La vivo post la morto formiĝas laŭ la pensmaniero de la koncerna individuo; ties morala kaj intelekta nivelo

Kiam homoj pensas pri la morto, kaj en sia konscio estas malferma al la eblo, ke povas esti vivo post la morto, la sekva penso estas: Kiel sin formos tia vivo? Kaj la respondo devas esti: la ebloj manifesti sin kaj sperti post la forlaso de la fizika organismo formiĝos laŭ la pensmaniero, kutimoj, kredo, kaj morala kaj intelekta nivelo de la koncerna homo. Tio, kio en speciala grado okupis la menson de homo, dum ĝi ankoraŭ vivis en la fizika mondo, ankaŭ same influos la estadon post kiam ĝi estas forlasinta tiun ĉi mondon. La pensoj de homo ja ne estas io palpebla; kelkaj homoj eĉ diras: “Pensoj, tio estas ja nenio”. Sed tio estas granda miskompreno. Klare, pensoj ne estas palpeblaj kiam ili ne manifestiĝas fizike, sed ili tamen ekzistas, kaj ili estas io esenca ĉe homoj. La tuta moderna civilizo konsistas el manifestitaj pensoj, kio efektive estas materiigitaj pensoj. Materiigo nome estas ne nur io, kio okazas ĉe spiritaj seancoj; ĉia fizika kreado estas en la realo variaĵo de materiigo. Temas pri transformado bazita sur la cikloj de la materioj, kaj tiu transformado povas okazi rapide aŭ malrapide, same kiel rado povas turniĝi rapide aŭ malrapide. Ekzemplo pri malrapida materiigo povas esti la konstruado de unu el la teknikaj majstraĵoj de la homoj, ponto trans abismo aŭ simile. Penso ĉeniĝas al penso en la konscio de la teknikisto, la rezistkapablo de la konstruaĵo estas skrupule kalkulita, oceano da skizoj estas kreitaj, eble ankaŭ modelo, kaj multaj aliaj stadioj estas trapasitaj, antaŭ ol finfarita ponto povas porti homojn super la abismon. Sed ĉi tiu finfarita ponto konsistas el materiigitaj pensoj, eĉ se ilin materiigi postulis plurajn jarojn. Ekzemplo pri rapida materiigo en la ĉiutaga vivo de la homoj estas radielsendoj. La pensoj de la prezentisto materiiĝas al vortoj en formo de specifaj sonondoj, kiuj denove malmateriiĝas per mikrofono kaj per nekredebla rapido traveturas la spacon. Nia radia ricevilo refoje materiigas la radiajn ondojn al sonondoj, kiuj trafas nian orelon, kaj pere de nia nerva sistemo kaj konscio denove malmateriiĝas kaj fariĝas pensoj. Io tiel ordinara kiel konstruado de ponto kaj elsendado de radiondoj do efektive havas kunligon kun io, kion la homoj kutime emus nomi supernatura. En simila maniero, multe el tio, kion la homoj nomas supernatura estas tute natura, kiam oni nur iom post iom ekkonas la leĝojn malantaŭ la tiel nomataj supernaturaj fenomenoj.

6. La homoj enkarniĝas en la fizikan mondon por lerni pensi

Kiam homoj komencas kompreni, ke ilia vivo en la fizika mondo estas vivo en materiigita pensomondo, ilia sinteno rilate al spiritaj problemoj iom post iom ŝanĝiĝos, kaj per tio ankaŭ ilia sinteno rilate al la tiel nomata morto. Sed homoj estas ankoraŭ tiel alkutimiĝintaj al la ideo ke pensoj ne signifas ion, “pensoj estas sendoganaj” oni diras. Sed la vero estas ke oni kaj ĉe la transformiĝo de la spirita al la fizika mondo, do ĉe la naskiĝo aŭ la enkarniĝo, kaj same ĉe la transformiĝo de

la fizika al la spirita mondo, do ĉe la tiel nomata morto, ja devas "pagi doganon" por oniaj pensoj, ĉar la sortokreado kaj en la fizika kaj spirita mondoj dependas de onia maniero pensi. Homoj enkarniĝas ĉi tie en la fizika mondo por lerni pensi logike, kio signifas pensi kongrue kun la leĝoj de la vivo. Kiam homoj ne faras tion, ili pensas erare, kaj en la fizika mondo "doloras" pensi erare.

7. Oni ne evoluas morale nek intelekte en la spiritaj mondoj

Tio, ke "doloras" pensi malkongrue kun la vivleĝoj iom post iom igas la homojn provi pensi en aliaj manieroj ol tiuj, kiuj kreis suferojn kaj dolorojn; ilia vivsinteno kaj konduto ŝanĝiĝas. Sed ĉu la homoj vere ne povus lerni ion tian en la spirita mondo? Ne, tion ili ne povus, ĉar en la spirita mondo ne ekzistas sufero nek doloro. Ke tiuj sentoj povas ekzisti en la transira stato aŭ la unua tempo tuj post kiam la estulo forlasis la fizikan mondon, sole ŝuldiĝas al la fakto ke tiu ĉi stato fakte estas parto de la fizika mondo, en kiu la homoj estas kaptitaj en sia propra materiisma pensmaniero. El ĝi ilin liberigas protektanĝeloj, kiam ili petas helpon, kaj ekde tiam ili travivas sian iradon tra la spiritaj sferoj. Iliaj travivaĵoj tie dependas de la enhavo en ilia konscio de pure homaj pensoj. La ĝojo esti kune kun aliaj homoj, kun kiuj oni estas sur sama ondolongo, ja povas esti granda jam ĉi tie en la fizika mondo, sed tio tamen estas nenio kompare al la ĝojo kaj amo al sia proksimulo, kiun oni sentos flui el la estuloj en la spiritaj mondoj. Muziko, arto kaj scienco estas apartaj pensoklimatoj, al kiuj ĉiuj kiuj interesiĝas, povas konkordiĝi en la spirita sfero en tiel koncentrita formo, kiel ilia konscio permesas. Oni do ne lernas ion novan en la spiritaj mondoj en tiu senco, ke oni evoluas morale aŭ intelekte. Sed oni malkovras, ke oni povas uzi la kapablojn, kiujn oni evoluigis en la fizika mondo pli grandskale kaj per tuja realiga forto. Oni pensas, kaj tuj la pensoj aperas kiel bildoj en spirita materio. Ankaŭ la spiritaj korpoj de la estuloj konsistas el pensomaterio, kaj pro tio nenio malhelpas ke homoj, kiuj konis unu la alian kaj ŝatis unu la alian, daŭre povas rilati en la spirita mondo. Tion ili povas, kaj kiam ili pensas unu pri la alia, ili renkontiĝos, kaj ili montros sin unu al la alia en formo, kiu similas al tiu, per kiu ili konis unu la alian en la fizika mondo, eĉ se la spirita korpo estos pli bela.

8. Dum oni vivas en la fizika sfero oni evoluigu sian pensomondon

Ne ekzistas kialo nutri mortotimon, ĉar la morto portas la homon en belan kaj luman pensomondon, sed ekzistas ĉiuj eblaj kialoj por labori pri la evoluigo de sia propra pensomondo dum oni vivas ĉi tie en la fizika sfero, ĉar per tio oni kreas eĉ pli grandajn kaj belajn eblojn por tio, kion la spiritaj mondoj povas alporti al oni, kaj samtempe oni kreas pli bonajn eblojn por tio, kion la venonta enkarniĝo alportos rilate travivaĵojn kaj pluan evoluon. Kiam la tera homo per vico da fizikaj enkarniĝoj kun paŭzo en la spiritaj mondoj, kiu formas sin kiel ciklon tra la spiritaj sferoj, estos puriginta sian pensomondon de restaĵoj de egoismo kaj materiismo, ĝi travivos kosmajn ekbrilojn dum fizika enkarniĝo kaj poste la plenan kosman konscion. Tiam ĝi estas lerninta pensi kongrue kun la leĝoj, ĝi povas pensi la pensojn de Dio, kaj ĝia plua evoluo formiĝos kiel tagokonscia kunlaboranteco en la servo de Dio. Tiam ĝi per siaj pensoj superis la morton kaj fariĝis unu kun la pensomondo de Dio.

La artikolo baziĝas sur manuskripto por prelego farita de Martinus en Martinus-Instituto dimanĉon 1949-11-13, poste prilaborita de Mogens Møller kaj akceptita de Martinus. Publikigita unuan fojon en danaj kontaktleteroj n-roj 14-15, 1959. Artikolo n-ro M0160. Tradukis Ejnar Langkilde, Hokan Lundberg, Henning Sato von Rosen.

La vojo al la paco

de Martinus

M2457

1. La malsimpatio aŭ la kaŭzo de aktivado de la mortiga principo en la konduto de la tera homo
Tiel longe, kiel la tera homo ankoraŭ ne estas plene inicita aŭ finevoluinta estulo, samgrade la unuaranga fundamento por ĝiaj agmaniero kaj konduto estas pezenergio enfermita en neintelekta sento, kaj ereto da instinkto. Laŭ "Livets Bog" pezenergio estas la samo kiel fajro, kaj sento estas la samo kiel malvarmo. En la organismo de viva estulo tiuj kosmaj energioj estas unuigitaj en ekvilibro inter tiuj du ekstremoj en formo de la normala temperaturo de tiu organismo. En la menso de la neinicita estulo la menciitaj bazaj energioj prezentiĝas en formo de varia superinfluo favore al la unu aŭ alia el la menciitaj energioj. En certa situacio tiu superinfluo karakterizas la tutan volaktivadon de la estulo kaj karakterizas la sekvan manifestadon de pensoj kaj agoj. Kiam la pezenergio estas superinflua kaj regas la sentoenergion, tiam la volo de la estulo estas influata de pli aŭ malpli neregata malsimpatio. Kaj laŭ la superinfluo de la pezenergio rilate al la sento tio montriĝas en kolero, flamiĝemo kaj la sekvaj venĝoj, bataloj, mortigoj kaj kripligoj. Ĝuste tiu stato ekzistanta konstante ĉe la rabobesto faras ĝin kapabla venki kaj mortigi sian viktimon. Ĉe la nefina homo tiu sama stato kreas ĉian malamikecon, kaj en sia plej domina kulmino ĝi aktiviĝas en la homaro en formo de militoj aŭ "ĉies milito kontraŭ ĉiuj". Ĉia malamikeco, ĉia venĝoago, ja ĉio, kio en la homo estas malo al la granda ordono de la proksimula amo: "Amu vian proksimulon, kiel vin mem" (Mat. 22.39), fontas el la superinfluo de la pezenergio en la estuloj. Ĝuste tiu superinfluo aŭ superdimensio de la pezenergio rilate al la sentoenergio en la estulo, estas la vera aŭ plej interna kaŭzo de la aktivigo de la mortiga principo en la manifestado kaj konduto de la estulo.

2. Mensaj forpuŝo kaj altiro
Kiam male la pezenergio fariĝas subinflua, kaj la sentoenergio estas superinflua aŭ estas superdimensia rilate al la pezenergio, tiam la estulo estas en mala situacio. Dum superdimensia pezenergio kreis la malsimpation de la estulo, la superdimensia sentoenergio kreas en konforma maniero la simpation de la estulo. Kaj la ĉiutaga kunvivado de la nefina homo kun la ĉirkaŭuloj kaj kunestuloj fariĝas vario aŭ ŝanĝiĝanta aktivigo de malsimpatio kaj simpatio, kiuj estas la samo kiel respektive mensaj forpuŝo kaj altiro.

3. Superdimensia sento kreas enamiĝon
Forpuŝo rezultigas amaron, koleron, persekuton, kalumnion kaj ĝenerale ĉion, kio povas detrui kaj damaĝi la objekton por la malsimpatio de la koncerna estulo. Male la altiro rezultigas troan simpation, specon de amo, kiu

efektive ne estas vera amo, sed estas ilo, pere de kiu oni atingas plenumon de certaj egoismaj avidoj. Tiu falsa simpatio aŭ amo estas konata per la jeno: Se oni ne plu povas atingi kontentigon per tiuj simpatioj aŭ egoismaj avidoj per alia estulo, ekz. ĉar tiu simpatio ne plu influas la alian estulon pro tio, ke ĝi satiĝis de tiu simpatio kaj logiĝas al aliaj estuloj kaj aliaj interesoj, do la simpatianto subite ŝanĝas sian sintenon al malsimpatio kaj klopodas pere de kolero kaj perfortaj agoj atingi tion, kion ĝi atingis antaŭe pere de sia simpatio. Ni vidas la saman principon kulmini en la enamiĝo de iu estulo al alia estulo. Ankaŭ tiu enamiĝo estas tre ekscesa simpatio, kiu estas aktivigita kaj portata de la avido de la estulo por posedi la objekton de la enamiĝo, kaj en tiu kunvivado la enamiĝinto sentas preskaŭ vivkondiĉan agrablon. Se inter la partneroj tiu agrablo estas reciproka, do ili spertas la kulminon de bonfarto aŭ vivfeliĉo de la pariĝa avido. Sed se tiu bonfarto komencas malaperi ĉe la unu partnero, ĉar tiu estulo komencas senti pli grandan agrablon pro alia estulo kaj pli grandan simpation al ĝi, do la ankoraŭ enamiĝinta partnero komencas senti al la kunsvatanto tiujn malsimpation kaj koleron, kiujn ni nomas ĵaluzo. Kaj en plej malbona kazo tiu estulo perfortas la objekton de sia enamiĝo, se ne sufiĉas pli milda formo. Ja troviĝas eĉ ekzemploj de tio, ke tia ĵaluza amanto eĉ mortigis la objekton de sia enamiĝo. Sed ĝuste tiun saman specon de "amo" ni vidas en la simpatioj de la ordinara ĉiutaga vivo. En la plej multaj kazoj ili estas nur metodoj, pere de kiuj oni havas aŭ povas vidi pli postajn avantaĝojn. Do tiaj simpatioj estas efektive nur efikoj de la sama principo kiel enamiĝo. Troviĝas nur tiu diferenco, ke ordinara enamiĝo estas la deziro pariĝi kun alia estulo, dum en la ordinara aktivado de simpatio al aliaj estuloj en la ĉiutaga konduto oni deziras "pariĝi" kun objektoj (ekposedi ilin), kiuj povas esti grandaj, avantaĝaj materiaj agrablaĵoj aŭ bonaĵoj. Tiu tuta egoisma simpatio estas efektive la samo kiel "snobeco". Ĉu ne la plej multaj homoj volonte demonstras sian tutan ĉarmon kaj faras multe por persono, kiu estas en granda pozicio kaj havas potencon kaj influon por helpi ilin al pli bona ofico, al pli granda pozicio en la socio aŭ al plenumo de aliaj el iliaj revodeziroj? Imagu viron, kiu en mizera kostumo eniras en grandan butikon tiel, ke laŭ sociala aŭ socia vidpunkto la ekspedistoj opinias, ke li estas nur sensignifa nulo. La servomaniero aŭ la malvarma kaj rifuza sinteno al li montras, ke tie li ne renkontas simpation kaj eble eĉ ne ordinaran afablon. Tie estas nur mensa malvarmo. Imagu, ke unu horon poste tiu viro revenas vestita plej altmode, multekoste kaj noble, kaj ke li alvenas al la butika portalo en unu el la plej modernaj kaj multekostaj aŭtomobiloj kaj kun privatŝoforo. Tiam ne plu estas la subordaj ekspedistoj, kiuj akceptas lin. Tute ne. Nun ĉefoj kaj subdirektoroj montras al li siajn plej grandajn ĉarmon kaj bonvolon por plaĉi al "la altranga viro". Atingi grandan favoron ĉe li povas havi tre grandan signifon por la kariero kaj pozicio. Oni do montras al la altranga viro mensan sintenon, kiu principe egalas al tiu, kiun oni montras pere de tiu enamiĝo, kiu laŭ sia plej profunda analizo estas nur pli alta formo de "snobeco". Al "la altranga viro" oni do montras tre energian snobecon. Per tio oni esperas atingi ĉe li plenumon de unu aŭ alia el siaj revodeziroj. Sed kio okazos, se tiu "nobla viro" tre volonte akceptas la grandan bonvolemon, sed ne reciprokas ĝin per eĉ eta afabla danko aŭ pli konkreta rekompenco? La enamiĝo do malaperis, fariĝis malsimpatio kun ĉiaspecaj esprimoj, kiuj en plej malbonaj kazoj

estas tiaj, ke ili estas pli aŭ malpli maldecaj por aperi ĉi tie. Tamen estas rimarkinde, ke en tia personaro povas kompreneble troviĝi personoj, kiuj estas esceptoj de la kutimo kaj sekve estas spirite pli maturaj, pli plenkreskaj kaj sekve komencas senti la saman simpation, ja kelkfoje eĉ pli grandan simpation por la malriĉa ol por la riĉa viro. Sed tiun analizon oni ne kreas surbaze de la esceptoj. Ĝi estu kreata surbaze de la ĝeneralaj faktoj.

4. La besta homo aŭ la solvo de la enigmo de la sfinkso

Ni sekve vidas, ke ĉi tie la egoismo ĉeestas en ĉiuj tiuj formoj de simpatio. Tiu formo de praktikado de simpatio do neniel estas vera, altruisma aŭ intelekta simpatio, kiu egalas al absoluta amo. Male ĝi estas nur ero en la sinkonserva instinkto de la nefina estulo. Ĝuste tiaj egoismaj avidoj karakterizas puran bestokonscion, dum ĉiuj altruismaj avidoj en la homo karakterizas la homon en pura formo. Tio do signifas, ke tiu parto, kie en la menso de la homo realiĝas egoismo, estas besta, kaj tiu parto en la menso, kie realiĝas altruismo, estas homa. Same kiel korpe la tera homo estas "mambesto", tiel laŭ konscio ĝi ankaŭ estas besto pro sia elstara besta parto en sia menso. Tiel la neinicita homo estas iomgrade "besto" kaj iomgrade "homo". Kaj tial ĝia manifestado aŭ konduto estas ankaŭ samgrade besta kaj homa. Ĝuste tio estas la solvo de la enigmo de la sfinkso.

Tio, kio devus esti la plej granda tasko de ĉiu registaro kaj ĉiu politika partio. Ĉu ne ĉiu registaro, ĉiu aŭtoritato, kiel ankaŭ ĉiu politika partio, devus havi kiel sian plej grandan taskon akceli sciencon, kiu evidentigas por ĉiu estulo la grandiozajn privatajn kaj publikajn bonaĵojn, kiujn rezultigas forigo de tiu superstiĉo en la cetere tiel intelekte aŭ materiscience evoluinta homo, ke aliaj estuloj estas ĝiaj malamikoj, kaj ke necesas kontraŭbatali tiujn estulojn per armiloj, mortigado, murdado kaj detruado? Laŭ la forigo de tiu superstiĉo oni vidos, ke la sola ekzistanta malbono troviĝas en la propra menso de ĉiu unuopa neinicita homo. Pro tiu malbono ĉiu homo estas sia propra ĝismorta malamiko. Esence la homo ne havas ian ajn malamikan regionon en la tuta granda universo. Ĉio ekzistas por servi al la vivaj estuloj. La absolute sola vojo al la daŭra paco sur la tero, kiun la tuta homaro tre forte deziras, estas ĝuste la scienco pri la besteco en la homo, kaj estas la sekva realigado de la pereo de tiu besta regiono en la propra interno, en la propra menso, en la propraj cerbo, koro, karno kaj sango. La kaŭzo de ĉia travivado de nia malpaco troviĝas absolute nur en nia propra interno. Nur tie troviĝas la kaŭzo de la spertado de la malpaco de tiuj estuloj. Tial en nenia ajn situacio ni povas kontraŭbatali la militon kaj per tio krei pacon en nia propra menso persekutante kaj konkerante aliajn estulojn.

5. La plej granda sangelverŝa superstiĉo de la dudeka jarcento

Tiu plej granda kaj plej sangelverŝa superstiĉo de la dudeka jarcento estas tio, kio nuntempe kreas atombombojn, tiujn ilojn por multigo de la malobeo al la vivleĝo aŭ la kvina ordono: "Ne mortigu" (Eliro 20.13). Imagu la kostojn de la homaro pro penoj kaj malfacilaĵoj, kaj pli kaj pli da impostaj ŝarĝoj en daŭre kreskanta regiono, kaj imagu ĉiujn milionmortigojn kaj detruojn de benaj kreaĵoj, kiujn oni faras per tio. Kaj ĉu ne la plej granda rezulto de tio estas, ke milionoj da sanaj, junaj kaj vivofortaj homoj fariĝas invalidoj, stumblantaj kaj krablantaj, blindaj kaj surdaj animalaj ruinaĵoj, sed tamen sufiĉe vivaj aŭ kun tiom da restanta perceptokapablo, ke ili povas sperti la humiligon, la ruinigon

aŭ tiun inferon, kiuj neeviteble trafas ĉiun mortiganton, murdanton aŭ sabotiston. Tiu terura superstiĉo, ke la proksimulo, aliaj homoj, nacioj kaj popoloj kulpas pro niaj sorto kaj malfeliĉo, kaj pro tio ni povas savi nin nur detruante ilin, tio estas tiel teruregа mortpuno al ni mem, ke la praktikado de ĝi neniam en ia ajn situacio povas krei pacon aŭ feliĉon por ni, sed neeviteble kondukas nin rekte en detruon kaj saboton de niaj propraj moveblo kaj bonfarto, kondukas nin en invalidecon kaj kulminon de fizika kiel ankaŭ psika suferoj. Tia stato plukondukas al vivabomeno, ja eĉ al timego por vivi, kaj en plej malbonaj kazoj finfine kondukas al sinmortigo.

6. Por la homoj estas mortige danĝere uzi sian potencon super la milionoj da ĉevalpovoj por saboti la vivon kaj posedaĵojn de la proksimulo

Estas do pli grave, ja estas absoluta vivkondiĉo lerni fariĝi same perfekta por praktiki la ĝustajn sintenon kaj konduton en la ĉiutaga vivo, kiel oni nun kredas, ke estas vivkondiĉo lertiĝi por uzi la modernajn inferajn maŝinojn kaj pere de ili povi trafi la malamikon mirinde precize kaj detrui lian vivon kaj liajn vivovalorojn. La superstiĉo de la tiel nomata malluma mezepoko estas do nenio kompare kun tiu superstiĉo, kiu en la dudeka jarcento regas homaron, kiu ekregis milionojn kaj milionojn de la ĉevalpovoj de la naturo. Tiu homaro povas ja eĉ rekte igi la elementojn labori por si. Ĝi estas homaro, kiu rigardas milojn da lumjaroj en la universon, en makrokosmon, kaj same povas tagokonscie observi la movojn de la atomoj en mikrokosmo. Tio estas ne nur tragika, sed tio estas ekstreme mortige danĝera. Oni povas opinii, ke pere de tia regado super la elementoj, ke pere de tiu grandioza potenco, oni devas detrui sian proksimulon, siajn kunhomojn, ĉar oni estas subigita al tiu imago aŭ kredo, ke tiuj homoj estas niaj malamikoj, do tio signifas detrui ĉion, kio povas konduki nin rekte en la pacon aŭ la normalan vivofeliĉon. Ĉio apartena al milito inter homoj aŭ ŝtatoj, ĉio nomata milita armado, ĉio kio kreas kanonojn, bombojn aŭ aliajn mortigilojn, ĉia propagando por militado, ĉio tio estas sabotado kontraŭ ĉiaj homaj feliĉo kaj vivo. Kaj laŭ kosma vidpunkto tio neniam ajn kaj en nenia ajn situacio povas esti intelekta agado.

7. Tio, kio sabotas ĉian protekton kontraŭ la milito kaj ĝiaj efikoj

La antaŭa teksto esprimas do agmanieron, kiu povas okazi absolute nur ene en la kulmina dominejo de la nescio kaj superstiĉo. Haltigi konflikton inter du partioj pere de milito estas neintelekta agado, kaj ĝi estas natura nur en la regiono de la besto. Ĝuste tiu neintelekta aŭ besta menso tenas la nuntempan tutan homaron ligita al la regionoj de la mallumo kaj morto aŭ “ĉies milito kontraŭ ĉiuj”. Tiu sama besta sinteno kreas la absolutan neprotekton kontraŭ la efikoj kaj akcidentoj de la milito en la tuta mondo. La homoj ne kuraĝas kredi je la vera kristanismo aŭ tio, ke oni devas alturni la dekstran vangon pro bato sur la maldekstra. “Remetu vian glavon en ĝian ingon; ĉar ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo pereos” (Mat. 26.52). Tiel longe kiel la homo ankoraŭ dubas pri la proksimula amo, kiu estas destinita por esti la unuaranga faktoro en la vivo de la homo, tiam ĝi pli kaj pli profundiĝas en la mortigajn kaj dolorigajn regionojn de ŝlimo kaj koto. Ili faras sin mem grandega brulema ligno sur la brulŝtiparo de la milito.

8. La tradicia kontesto kontraŭ la kontraŭmilita sinteno

Kutime oni havas tiun tradician malnovan konteston, ke oni ja ne povas

simple kaj trankvile vidi, ke ekzemple fremdaj soldatoj seksatencas kaj perfortas onian edzinon kaj aliajn virinojn. Kaj oni ankaŭ ne povas pasive vidi, ke rabistoj kaj banditoj brutale kaj perforte al plenkreskuloj kaj infanoj ruinigas kaj rabas, malhonorigas kaj kripligas ĉirkaŭ si. Se ĉi tie ĉiuj alturnas la dekstran vangon, kion oni do kredas, ke okazos? Ĉu ne ĝuste tiun timon havas ne nur privataj personoj, sed ankaŭ plej altgrade havas la ŝtatoj kaj popoloj inter si. Ili ĉiuj mobilizas kaj armas sin timante atakon de aliaj popoloj kaj ŝtatoj. La grandiozaj multekostaj militkonstruaĵoj, la geniaj mortigomaŝinoj, atombomboj kaj aliaj mortigiloj konstruitaj je la kosto de la ekonomio kaj normala bonfarto de la ŝtatoj, ili ĉiuj estas rezulto de timo. Kaj la demando estas do, ĉu tiu timo havas bazon. Ĝenerale la tera homo ne havas kapablon rigardi en la estontecon. Efektive ĝi ne povas kun certeco antaŭvidi sian morgaŭan sorton, ja eĉ ne en la sekva horo. Kaj ankoraŭ malpli ĝi povas antaŭvidi la sorton de sia proksimulo aŭ de tiuj estuloj, kiujn ĝi ja timas. Kiel oni do povas prave aserti, ke tiu aŭ alia homo certe estas gislime ekipita por mem eviti atakon aŭ por povi protekti eventualajn parencojn, edzinon kaj infanojn? Por kosme neinicita homo estas tute maleble antaŭdiri ion absolute veran pri tio. Ĉi tie ĉio povas esti nur hipotezoj kaj supozoj. Povas esti eĉ tiu granda eblo, ke ĝuste por tiuj menciitaj parencoj tute ne postrestas malluma kaj mortiga sorto, ĉar antaŭ longe en siaj vivo kaj konduto ili kreis aŭ evoluigis por si aŭron, kiu faras ilin imunaj kontraŭ ĉia vivsabota sorto. Devigi tiujn estulojn porti mortigilon kaj per minaco pri puno kaj mortkondamno devigi ilin mortigi kaj murdi sian proksimulon, kontraŭ kiu ili jam estas protektitaj pro sia evoluinta aŭro, tio ne estas nur terure maljusta kaj sensenca, sed estas efektive la samo kiel la ago “peki kontraŭ la Sankta Spirito” (Jer. 3.25). Pri tiu peko diriĝas, ke ĝi ne estu pardonata. Kiam sen la plej eta respekto al la psiko de la unuopa individuo, al ĝia vivkoncepto kaj morala konduto, la ŝtatoj aŭ aŭtoritatoj devigas ĉiujn esti militistoj, mortigantoj kaj sabotistoj, tiam ili kulpas pri agmaniero, kies efikoj ne estas “pardoneblaj”, kio signifas, ke ili ne estas eviteblaj. Kaj per tio oni devigas homojn, kiuj antaŭ longe forevoluis de la regiono de la milito, homojn kiuj ne plu povas mortigi kaj murdi, venĝi kaj malami, kaj kiuj sekve ĉiu unuope estas regiono de paco, oni devigas ilin esti militistoj kaj krei malpacon, morton kaj pereon. Per tio ŝtatoj kaj aŭtoritatoj sabotas tiun regionon de la paco, kiu jam formiĝis aŭ estiĝis en la ŝtato, kaj tion ili faras anstataŭ apogi, agrabligi kaj prizorgi tiun sian solan kaj veran regionon de kulturo. Tiel longe kiel sen psikologia respekto al la unuopa individuo la ŝtatoj kaj aŭtoritatoj devigas ĉiujn esti militistoj, sabotistoj kaj mortigantoj, tiel longe ili militas kaj sabotas kontraŭ sia propra pacregiono. Per tio ili fariĝas malamiko al si mem, kaj tiu malamiko estas ankoraŭ pli terura ol tiu “malamiko”, kiun ili volas kontraŭbatali per milito. Sed ŝtatoj kaj aŭtoritatoj, kiuj troviĝas en sanga milito ne nur kontraŭ la proksimulo (aliaj ŝtatoj), sed ankaŭ en interna milito kontraŭ si mem (la militodevigo al tiuj homoj, kiuj plenkore estas humanistoj kaj pacaj homoj), kiel tiuj ŝtatoj kaj aŭtoritatoj povu fariĝi spertuloj pri kreado de paco? La Biblio ja pravegas. La peko kontraŭ la Sankta Spirito ne estas pardonebla. La milito kontraŭ la proksimulo kaj la milito kontraŭ si mem estas saboto kontraŭ la spirito de Dio. Tie povas domini nur la inferaj agoj. Tie estas la hejmloko de la plorado kaj la grincado de dentoj.

9. La vojo al la paco

La vojo al la paco estas ekskluzive nur la kompreno de tio, ke la elekto de soldatoj, alivorte la elekto de militistoj, rajtas okazi nur al tiuj, kiuj efektive kaj plenkore estas militistoj. Devigi homojn, kiuj plenkore estas humanistoj kaj ne havas koron por mortigi aŭ kripligi vivajn homojn, devigi ilin esti militistoj, tio estas do la samo kiel saboti kaj detrui la jam kreitan pacon. La paco estiĝas nur en la kreskejo de la proksimula amo. Se oni ne prizorgas kaj flegas tiun kreskejon, oni ne kredu, ke tie oni povas rikolti la vivigajn fruktojn de la paco.

En ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj troviĝas homoj, kiuj ankoraŭ estas denaskaj militistoj, homoj kredantaj, ke ĉio estu decidita per potenco. En la regiono de la rajto kaj humaneco ili estas ankoraŭ grandskale analfabetoj. Ĝuste tiuj homoj estas la kreskejo de la milito kaj malpaco. Ili estas la naturaj malamikoj kontraŭ la militistoj de aliaj ŝtatoj. Tiel longe kiel ŝtato havas armeon kaj devas rekruti soldatojn, ĝi devas povi psikologie distingi la militistojn de la humanistoj kaj sekve povi rekruti la militistojn kiel soldatojn kaj liberigi la humanistojn, kiuj ja neniel kaŭzis la ekziston de la milito. La ŝtatoj ja tute ne povas malhavi siajn humanistojn, ĉar neniu paco estas kreebla sen denaskaj humanistoj. Lasi humanistojn aŭ pacospertulojn ekstermiĝi sur la batalejoj kune kun la militistoj, tio ja signifas forĵeti la infanon kune kun la banakvo. Tio sabotas ĉiujn kondiĉojn aŭ eblojn por krei pacon. La sola vojo al protektado kontraŭ la malbono, kontraŭ atakoj, perforto kaj brutaleco de aliaj homoj ne estas mortiga sabotado, mortigado kaj murdado. Male la agado estas elpurigi sian propran internon de ĉio de tiu speco, ĉar la bestaj kaj mortigaj fortoj en la interno de la homo estas la fonto de ĝia eventuala milito kontrau la proksimulo, kaj de tiuj lezoj kaj mallumaj sortoj, kiujn tio sekvigas. Sed kontraŭ tiu revenanta efiko de malluma manifestado al la proksimulo ne troviĝas protekto. Tiel estas, senkonsidere kiom da militiloj kaj kiom da divizioj aŭ armeoj da soldatoj, kiom da polico aŭ justico oni imagas necesa por sia protekto. La sorto trafas la homon senerare, same en kvietaj ĉirkaŭaĵoj kiel meze en la mortiga agado de la milito. La leĝo plenumiĝas. “Se iu per la glavo mortigos, li devas per la glavo esti mortigita” (Ap. 13.10). La vojo al la paco estas do ekskluzive la agado doni al nia proksimulo tiujn pacon kaj benon, en kiuj ni mem deziras vivi.

Unua publikigo de la artikolo en danaj Kosmos 5-6, 1952. Originala dana titolo “Vejen til freden”. Artikolo n-ro M2457, traduko Ib Schleicher en 1999.

La sekreto de la piramido

Parto 2 el 3

de Ole Therkelsen

5. La naskiĝo de la homa principo ĉe la piramidoj antaŭ 90.000 jaroj

La simbolo de Martinus plej simila al la piramido de Keopso estas tiu titolita *La Principo de Mondliberigado* (LEM1 simbolo n-ro 2). El la sekvonta legaĵo montriĝos ĝuste ke la piramido de Keopso ludas tute centran rolon lige al la kreo de homa monda kulturo aŭ humana monda moralo. La hela flanko de la homara edukiĝ-procezo, organike enkonstruita en la kosma gepatra principo, la principo de mondliberigado, komenciĝis antaŭ preskaŭ cent mil jaroj, kaj ĝi finiĝos post kelkmil jaroj lige al la kreo de nova monda moralo, kiu principe estas pura Kristomoralo. Ĉi tiu procezo reale estas tute analoga al iu kleriga plano de instru-ministerio ekde infanĝardena klaso ĝis universitata kandidata ekzameno.

Ĉi tiu unua homecigo aŭ humanigo de la primitiva bestohomo laŭ Martinus komenciĝis antaŭ ĉ. 90.000 jaroj ĉe la piramidoj. Plej konata estas la plej granda piramido, tiu de Keopso, la sola el la sep mirindaĵoj de la antikva mondo, kiu ankoraŭ konserviĝas. La naturscienco hodiaŭ indikas ke la piramido estis konstruita antaŭ maksimume 5.000 jaroj.

En siaj Kristnaskaj prelegoj Martinus ĉiam tuŝis la mondliberigan principon, kiu funkcias per tio ke la pli aĝaj fratoj en la evoluo helpas al la pli junaj. La helpo povas veni per spirita vojo, aŭ ĝi povas veni per la naskiĝo de mondliberigantoj kiel ekzemple Moseo, Budho, Jesuo kaj Mohamedo. En la prelego *Kristnaska etoso* eldirita la 15-an de decembro 1958 Martinus ekparolas pri tio ke ne la besta principo donas Kristnaskan etoson, sed male la homa principo nun naskiĝanta sur la teron.

Martinus: “Tiu grandioza naskiĝo de tiu dia principo komenciĝis antaŭ ĉ. 90.000 jaroj, kiam la homaron fekundigis iuj grandaj estuloj enkarniĝante sur la teron. Ili fondis la fundamentajn principojn de la tuta materia scienco en la piramidoj de Egiptio. Tion mi ne priparolos, sed tio estis naskiĝo kie ekestis la unuaj homaj statoj. Tiutempe la homoj estis iaj bestohomoj, sed kelkaj tamen estis tiel maturaj ke oni povis komenci influi ilin, tiel ke la humaneco povis ekkreski.” (*Kosmos* n-ro 12/1992).

Martinus parolis pri tri eventoj kiuj havis gravan influon al la evoluo de la homaro, nome la Piramida Evento, la Mosea Evento en Sinajo kun la dekalogo kaj la Kristo-evento kun la krucumo.

6. La piramid-konstruantoj de Egiptio

La piramid-konstruantoj de Egiptio estis tre progresintaj en spirita evoluo, kaj laŭ Martinus ili havis enorman scion pri la materio, scion kiun la hodiaŭa materia scienco tute ne povas ekkoncepti. Ili povis materiigi kaj dematerigi materiaĵojn. Ili povis transformi solidaĵojn, likvaĵojn kaj gasaĵojn en psikajn aŭ radiajn ekzistaĵojn, kaj tiujn ekzistaĵojn povis retransformi en

fizikajn materiaĵojn. Martinus skribas pri ĉi tiu kvara fizika stato, la radia stato, interalie en *LB5*, par. 1637, 1936 kaj en pluraj artikoloj, interalie en *Kosmos* n-roj 5/1991, 9/1998 kaj 3/2009.

Ĉi tiuj homoj konis elektro-magnetajn fortojn kaj irejojn en la spaco, per kiuj ili, se tiel diri, kapablis movi montojn. Per tiuj fortoj estis facile manipuli la grandajn ŝtonblokojn per kiuj la piramidoj estas konstruitaj. Ili konis la iradon de la steloj kaj ties signifon kaj influon al la kreado en la materio. Al Martinus oni ofte demandis kion li opinias pri astrologio, kaj li ĉiam atentigis ke la astrologio estis granda scienco en antikva Egiptio, kaj ke la hodiaŭa astrologio estas nur ombro de tio kio ĝi iam estis.

La konstruantoj de la piramidoj ne ricevis siajn sciojn kaj kapablojn ĉi tie sur la terglobo, kiu antaŭ jarcentmiloj estis sur relative malalta evolu-ŝtupo. Ili estis misiistoj de pli evoluintaj planedoj aŭ mondoj. Laŭ Martinus nome eblas ĝis iu grado al pli evoluintaj estuloj enkarniĝi en malpli evoluintajn estulojn kaj tiel per sia pli evoluinta mentalito fekundigi la mensan atmosferon de la terglobo. (*Kosmos* n-ro 12/1991).

Kiam la piramidoj estis konstruataj, la homoj unuafoje estis tiom progresintaj en la evoluo, ke ili estis akceptemaj al pli alta spirita aŭ religia konsiliĝo. La kultado de la absoluta Dio komenciĝis ĉe la piramidoj en Egiptio. Eĉ hodiaŭ ĉi tiuj piramidoj parolas lingvon de la plej alta scienco pri la materio kaj psiko. Ĉi tiuj scienco kaj amo estas dokumentitaj per monumento kapabla konserviĝi dum tempo senmezure longa kompare al la vivodaŭro de homo. Al tiuj kiuj kapablas kompreni la lingvon piramidan, la piramidoj estas vizitkarto aŭ dokumento el mondo pli alta.

Kutime Martinus evitis mencii lokajn geografiajn rilatojn, preferante teni sin ekskluzive al principaj kaj logikaj analizoj, sed li sugestis ke la kosme konsciaj helpantoj kaj konsilantoj sur la tero iel rilatis al finevoluinta planedo situanta centre de la Lakta Vojo. (Vidu la ĉi-sekvan par. 5.22 kaj *Kosmos* n-ron 8/2009).

En astrologio la zodiaka signo Sagitario interalie reprezentas filozofion kaj spiritan sciencon, kaj tial estas aparte interese ke, kiam la antikvaj grekoj antaŭ iom pli ol du mil jaroj nomis la diversajn konstelaciojn, la sago en la konstelacio de Sagitario okazis direktiĝi ĝuste en la centron de la Lakta Vojo, de kie eliradas la kosmaj impulsoj.

7. Superteraj kre-metodoj serve al la mondliberigo

Laŭ Martinus la 2,5 milionoj da ŝtonblokoj de la piramido de Keopso do

Martinus kaj Sam Zinglersen rajdas sur kamelo en Egiptio en 1961

ne estis tien metitaj de sklavoj, sed per magio aŭ psika forto. Per dematerиigo de la ŝtonoj ili transformiĝas en radian staton, post kio ili same kiel radioondoj estas forsendeblaj por poste rematerиiĝi en la dezirata loko.

Pri materиiĝo Martinus skribas: "Ekzemplo de rapida materиiĝo en la ĉiutaga vivo de homoj estas la radio. La pensoj de la anoncisto materиiĝas en vortojn, do en specifajn sonajn ondojn, kiuj siavice dematerиiĝas en la mikrofono kaj nekredeble rapide flugas tra la etero. Nia radioricevilo rematerиigas la radioondojn en sonajn ondojn, kiuj trafas nian orelon." (La morto kaj la pensa mondo de la homoj, *Kosmos* n-ro 3/2005).

Martinus pli multe skribas pri materиiĝo kaj dematerиiĝo, mirakloj kaj superteraj kre-metodoj en la Biblio, interalie en *La geedzeco kaj la ĉioamo*. (Artikolaro 1, par. 41.32-41.35). Martinus ne parolis pri nifoj, sed uzis la esprimon 'materиiĝoj el la vera homa regno'.

Laŭ Martinus la apero de miraklo estis io same natura kiel ĉiu alia formo de kreo. (*LB3* par. 757). Miraklo estas nur fenomeno kiu eskapas la ĝenerale konatajn fizikajn leĝojn de kreo aŭ manifestiĝo. (*LB3* par. 756).

Oni povas legi pli multe pri materиiĝo en *Kosmos* n-ro 8/2006 kaj *LB5*, par. 1936, pri "Altpsika magio" en *LEM3* par. 33.71, 33.74 kaj pri La primara kaj la sekundara resurekto en libro 22, ĉap. 7.

8. La profetaĵo de Jesuo pri la kriado de ŝtonoj

La piramido tiel estas atestaĵo pri pli evoluintaj homoj, pri scienco kaj grandaj konsci-kapabloj. La ŝtonegoj parolas jam nun al tiuj kiuj komprenas la lingvon piramidan, sed krom tio Martinus al proksimaj kunlaborantoj ŝajne sugestis ankaŭ ke oni eble faros en la piramido malkovrojn kun rekta rilato al lia misio de kreado de la sprita scienco. (Olav Johansson, La sekreto de la piramido, *Kosmos* n-ro 1/1988 kaj 4/1993). Tia malkovro ankaŭ povus esti interpreto el la jenaj enigmaj vortoj de Jesuo: "Mi diras al vi, ke se ĉi tiuj silentos, la ŝtonoj ekkrios". (Luko 19.40).

Koncerne la silentadon, la profetaĵo de Jesuo ĝis nun bone konformas al la tuŝotimo de la scienco kaj la masiva prisilentado de la publiko pri la verkaro de Martinus. Pensige estas ke la eĉ tre ampleksa verkaro de Martinus kun ĉ. 10.000 paĝoj plu estas praktike neatentata aŭ nekonata de la granda publiko, malgraŭ ke liaj libroj komencis esti eldonataj jam en 1932. Sed eble nova trovaĵo sub la Sfinkso aŭ en la piramido de Keopso rilate al Martinus kriigus la ŝtonojn kaj alvokus la intereson de la publiko.

Daŭrigo 3/3 sekvas. Pli da informoj en "Martinus kaj la nova monda moralo", www.martinusshop.dk. Tradukis la tekston el la dana Jens Stengaard Larsen.

Martinus sidanta inter la gamboj de la sfinkso en 1961

Esperanto Por UN

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Homrajta Tago, 10. decembro 2019

Ĉiujare, la 10-an de decembro, ni festas la Tagon de Homaj Rajtoj. Temas pri la dato en la jaro 1948 kiam la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis akceptita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj.

Fundamenta al la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj enskribita en ĝian Ĉarton estas respekto de homaj rajtoj kaj la rajto de ĉiuj homoj vivi sian vivon en libereco kaj digno. Artikolo 1.3 de la Ĉarto aludas al la celado "antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio."

La Homrajta Tago estas aparte grava al nia Asocio, Universala Esperanto-Asocio, pro du kialoj.

Unue, ĝi memorigas nin, ke, jam en la jaro 1947, la nova statuto de nia Asocio enhavis deklaron, ke respekto de homaj rajtoj estas necesa kondiĉo por nia laboro kiel neregistara organizaĵo. Ankoraŭ hodiaŭ ĝi restas esenca elemento en nia laboro.

Due, la Homrajta Tago okazas kvin tagojn antaŭ la Zamenhof-Tago, la 15-a de decembro, la tago en kiu la fondinto de la Internacia Lingvo Esperanto, L.L. Zamenhof, naskiĝis en 1859. Niaj lokaj kaj naciaj kunlaborantoj ofte festas la Tagon de Homaj Rajtoj kaj Zamenhof-Tagon samtempe, emfazante la ligon inter la streboj de Zamenhof favore al internacia interkompreniĝo, unuflanke, kaj la rekonado de universalaj homaj rajtoj, aliflanke.

La alvoko de la Ĉarto de UN pri "respekto al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio" memorigas nin, ke netolero de lingvaj diferencoj ofte formas la radikojn de ksenofobio kaj povas provoki perfortajn konfliktojn. Pro tio nia Asocio alvokas al respekto de ĉies lingvoj, kaj antaŭenigas la Internacian Lingvon Esperanto kiel ponton trans lingvaj diferencoj.

Okaze de la Homrajta Tago 2019, ni alvokas al respekto por lingva malsameco, por ĉies rajto uzi la propran lingvon, kaj por klopodoj trovi pontojn inter lingvoj, kiuj favoras egalecon, toleremon kaj pacon.

Bonvenon al la retejo de Esperanto Por UN

Ĉi tie troviĝas informoj pri Esperanto kaj Unuiĝintaj Nacioj. Universala Esperanto-Asocio havas oficialajn kunlaborajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj kun Unesko, kaj ni laboras subtene al UEA. Ni ankaŭ subtenas multlingvismon ĉe UN kaj uzon de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj ni klopodas informi kaj eduki esperantistojn pri la graveco kaj valoro de UN. Ni havas teamojn de reprezentantoj en Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Parizo, kaj kunlaborantojn dise tra la mondo.

Nia retejo enhavas informojn pri UN, tradukojn de bazaj UN-dokumentoj en Esperanton, terminaron, videojn kaj aliajn utilajn materialojn.

www.esperantoporun.org

Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Saluto de UEA okaze de la 160-a dat-reveno de L.L. Zamenhof, la 15-an decembro 2019

Ludoviko Lazaro Zamenhof naskiĝis antaŭ 160 jaroj.Li iniciatis la internacian lingvon Esperanto ne ĉar li interesiĝis pri lingvoj, sed ĉar li interesiĝis pri paco. Kaj paco povas ekzisti kaj daŭri nur se ĝi baziĝas sur justeco kaj egaleco inter homoj, hom-grupoj, kaj popoloj.

Surbaze de ĉi tiuj valoroj la internacia lingvo Esperanto travivis unu el la plej sangaj jarcentoj de la homa historio, la 20-an, kaj ankoraŭ luktas por ĝeneraligi tiujn valorojn.

Fakte la mondo en la lastaj 160 jaroj kerne ne ŝanĝiĝis. Maltoleremo kaj perforto, deziro regi aliajn popolojn kaj perfido al sia grupo por ricevi avantaĝojn de la regantoj estas tre nuntempaj problemoj. Tio bedaŭrinde ofte prenas la formon de milito kun amasa mortigado de homoj aŭ de trudataj ekonomiaj limigoj, alivorte de trudata ekonomia malprogreso de la trafitaj landoj.

Religioj, kies kunlaboron Zamenhof alvokis dum la tuta vivo, nun estas uzataj kiel ilo por dividi kaj militigi inter si homojn.

Ĉu ni devas akcepti ĉi tiun situacion? Ĉu ni devas pensi, ke per la inteligentaj telefonoj komenciĝis nova epoko, nova civilizo, nova mondo?

Ne, ni ne devas kaj ne povas, kaj ni devas serĉi aliancanojn por vere plibonigi la mondon en la kampoj de paco, ekonomio, kulturo kaj homa feliĉo.

Se ni rigardas ĉirkaŭ ni nur la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj emus fari ion tian, ekzemple per siaj 17 celoj pri daŭripova evoluigo. Tiu organizaĵo, kiu ĉi-jare festas sian 75-an jariĝon, neniam atingos tiujn celojn, se ĝi restas kaptita de registaroj, kiuj vorte laŭdas tiujn celojn kaj fakte melhelpas la atingon de ili. Estos necese apogiĝi sur la kelkaj progresemaj registaroj en la mondo kaj sur la homoj, kiuj deziras pacon, progreson kaj feliĉon.

Estas tempo por UN aŭskulti la homojn kaj fari siajn la idealojn de L.L. Zamenhof. Ili estas pli aktuale gravaj ol iam ajn antaŭe. Ne hazarde UEA, la monda organizaĵo de la parolantoj de Esperanto dediĉas al tiu temo sian mondan kongreson en Montrelo en 2020: “UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo.”

Internacia mondlingvo

26.25 Estas nature kaj klare, ke en la monda ŝtato aŭ internacia monda regno oni ne lame iros per naciaj lingvaj lambastonoj, per interpretistoj kaj pli aŭ malpli malbonaj tradukoj. La monda ŝtato kompreneble havos sian propran specialan internacian lingvon. Ĉiu unuopa infano en la lernejoj en la tuta mondo ricevos edukon en tiu internacia lingvo de la monda ŝtato. Imagu kia faciliĝo estos por la homoj de tiu tempo tute ne havi lingvajn barojn, senkonsidere kie ajn ili troviĝos sur la tero. Ĉiuj homoj en la mondo, de la sudo kaj la nordo, de la oriento kaj la okcidento, povos interparoli, povos interkompreniĝi. Per komuna lingvo la tuta mondo estos komuna patrolando por ĉiuj homoj sendepende de nacieco, kulturo kaj raso. Imagu kia faciliĝo aŭ laborŝparo, ke ne necesos traduki iajn ajn librojn aŭ skribaĵojn. Ĉiuj povos legi ĉion. Ke neniu el la ekzistantaj naciaj lingvoj estos uzata kiel tiu komuna lingvo, tio kompreneble estas tute certa. Neniu ajn el tiuj naciaj lingvoj estus uzebla sen eventuala estiĝo de ĵaluzo aŭ amaro, eble eĉ ankaŭ milito. Tial la mondo havos neŭtralan internacian lingvon. Kiam oni komencos instrui ĝin en ĉiuj lernejoj de la mondo, la infanoj, kiuj lernos ĝin, atingos la kapablon interparoli sendepende de nacieco kaj raso. Tio kontribuos al multe pli granda unuiĝo de la homoj en amikeco kaj paco, kaj daŭre pli altgrade faros ilin interligita frata popolo en la tuta mondo.

Ĉitaĵo el *La Eterna Mondbildo* 2, Simbolo n-ro 26, “La venonta perfekta homregno”, par. 25

Resuma klarigo de simbolo n-ro 14

La kosma spiralciklo 1
Ĉiuj vivantaj estaĵoj formas parton de eterna organika kunlaboro organizita kiel spiralciklo. En ĉiu ciklo la estaĵoj spertas movon el mallumo aŭ malsaĝeco al lumo aŭ kosma konscio kaj amo, kaj poste al novaj spertoj de mallumo kaj lumo en novaj spiralcikloj. Ĉiu nova spiralciklo spertiĝas kun nova variado. Ĉiu vivanta estaĵo estas makroestaĵo kiu provizas vivan spacon kaj vivkondiĉojn por mikroestaĵoj de subaj spiraloj, kaj samtempe ĝi mem estas mikroestaĵo kiu ricevas vivan spacon de makroestaĵoj de spiraloj super ĝi. La ĉefaj detaloj de la simbolo:

- La simbolo reprezentas sep kosmajn spiralciklojn.
- La spiralciklo markita per D simbolas la ciklon, en kiu ni mem situas kaj ĝi konstituas nian mezokosmon.
- La spiralcikloj A-C konstituas nian mikrokosmo. La C-spiralo simbolas niajn organojn, la B-spiralo niajn ĉelojn, kaj la A-spiralo la mikrovivon, kiu estas priskribita kiel substanco aŭ materio.
- La spiralcikloj E-G konstituas nian makrokosmo. La E-spiralo estas la loko kie situas la planedoj, la F-spiralo enhavas la sunsistemon, kaj la G-espiralo la galaksisistemon, Laktavojon.
- La spiralciklo daŭras senfine tiel en la makrokosmo kiel en la mikrokosmo.

Vidu ankaŭ la priskribon de Martinus de simbolo n-ro 14 en *La Eterna Mondbildo 1.*

Mencioj de Esperanto en Granda Kurso

Naciaj kaj internaciaj lingvoj – Esperanto

492. En la Biblio ni povas legi, ke iam estis neceso, ke la lingvoj malsimilu. [Babela Turo]. La malmultaj homoj sur la tero tiutempe tendencis kolektiĝi kaj grupiĝi, kaj la resto de la mondo senhomiĝis. La lingvo ne subite ŝanĝiĝis, sed la evoluo mem disvastigis la homojn. Dum ili vivis en specialaj grupoj for de aliaj grupoj, ili akiris siajn proprajn spertojn kaj ideojn, sian esprimmanieron kaj propran lingvon. Tiel multaj diversaj lingvoj aperis, kaj tio kaŭzis la fortigon de naciismo.

Sed nun por multaj homoj malfacilas ne povi paroli fremdajn lingvojn, kaj ili devas multe uzi la plej grandajn kaj disvastigitajn naciajn lingvojn. Sed tio ne sufiĉas. Ni vidas ke estas tendencoj evoluigi aliajn lingvojn, lingvojn kiuj ne estas naciaj lingvoj, sed internaciaj lingvoj.

Ni vidis idealiston krei mondlingvon, *Esperanto*, kiu ludos treege gravan rolon, *ĉar ĝi estas kreita laŭ la diaj principoj,* ĉar ĝi estas logika, kaj ĉar ĝi estas facile lernebla. Tio ankaŭ estas io kio indikas ke venos alia ekzisto. (Martinus, *Granda Kurso, La eterna mondbildo*, par. 492).

En la nuna vivo oni povas komenci konstruadon de la venonta vivo

283. Tiam, kiam la homoj komprenos, ke oni vivas plurajn vivojn, kaj ke multaj okazantaj eventoj hodiaŭ en nia sorto estas io, kio okazaj pro niaj pasintaj animalaj spertoj, tiam ili komencas zorgi pri estontaj vivoj kaj organizi kaj aranĝi sian nunan vivon laŭ tio. Mi scias pri maljunulo, kiu estis proksima al 90 jaroj, kiam li eklernis *Esperanton*. Li diris, "jes, oni ĉiam povas akiri kelkajn talentkernojn pri tiu lingvo". Kaj li pravas. Li neniam farus tion, se li estus tiel religema, ke li kredus, ke oni neniam revenos en la fizikan mondon. Religema homo pensus, ke en la ĉielo oni ne bezonus *Esperanton*, kion ni kompreneble ne bezonas.

Jen tio tiel vigligos homojn ŝanĝi sian vivon, kaj tio ja tre bonas. Pensu, vi povas komenci konstrui vian estontan vivon hodiaŭ! – Ĝuste kiel la inĝenieroj konstruas diversajn aferojn, do vi povas komenci konstrui vian vivon kaj decidi vian sorton, se vi nur akiros tiun inĝenieran scion, sur kiuj baziĝas feliĉa sorto. Sed feliĉa sorto povas nur baziĝi sur perfekta konduto. Kiam homo havas kompletan scion pri aliaj homoj, ĝi scias, kial ili estas kiel ili estas, kaj ke ili devas esti, kiel ili estas. Oni scias, ke tio estas io, kion oni ne povas ŝanĝi, sed tio estas io, pri kio oni devas esti atentema kaj singardema. (Martinus, *Granda Kurso, La eterna mondbildo*, par. 283).

Traduko Ole Therkelsen

Esperanto kiel oficiala internacia lingvo de Martinus Instituto



Martinus

En sia kunveno la 5-an de aprilo 1965 la konsilio unuanime decidis, ke Esperanto estu la oficiala internacia lingvo de Martinus Instituto kaj de ties internacia organizo, kiun oni planis starigi. Kune kun tiu decido oni faris la jenan deklaron:

Estas fakto, ke niatempe la homaro troviĝas en daŭre progresanta evoluo al tiu internaciismo, en kiu partopreno fariĝos vivkondiĉo por ĉiu ŝtato kaj por ĉiu unuopa homo.

Tiu evoluo kondukas al multaj formoj de forta iniciato por progresigi ĉiujn specojn de komune homaj kaj humanismaj aktivecoj, al kiuj apartenas ankaŭ laborado por la internacia lingvo

Ni estas plene konvinkitaj pri la neebleco de elekto de nacia lingvo por tiu internacia pozicio. Pro la malfacilaĵoj kaj ceteraj malavantaĝoj pri elekto de nacia lingvo, ni same estas tute konvinkitaj, kaj laŭ vidpunkto de la tuta homaro tia elekto ne estus sufiĉe praktika. Tial ĝi estus ankaŭ nedezirinda solvo, ĉar troviĝas iu pli efika.

La oficialaj, dokumentitaj faktoj pri Esperanto, la agnosko de ĝi flanke de gravaj oficialaj instancoj, ĝia facileco, ĝiaj fleksemo kaj esprimkapaploj, kaj krome ankaŭ la praktikaj rezultoj atingitaj per ĝi, montras superan probablecon de ĝia elekto kiel fina mondlingvo.

Ankaŭ la multjaraj spertoj de la laboro de nia Instituto montras la superan taŭgecon de Esperanto, ne nur kiel unu el la lingvoj por la laboro, sed ankaŭ kiel sekura ponta lingvo al eĉ la plej grandaj naciaj lingvoj.

Sendepende de la sinteno de la cetera mondo al la internacia lingvoproblemo, Esperanto estas ilo kvazaŭ kreita por la celoj de la Instituto, por gvidado kaj aministrado

de ĝia internacia organizo, kaj grandskale ankaŭ por ĝisfunda komunikado kun eksterlandaj interesuloj, eble precipe de foraj lingvoj.

Tio tamen ne signifas, ke la naciaj lingvoj estu flankenŝovitaj, aŭ ke ili havu malgravan signifon. Tute kontraŭe! – Absolute memkomprenebla afero estas, ke ankaŭ ĉiu ajn nacia lingvo estu uzata ĉie, kie tio estas utila kaj celtaŭga. Estas eĉ tiel, ke ankaŭ pere de Esperanto okazu tre forta iniciato por krei tiel multajn, tiel amplekajn kaj efikajn aktivecojn, kiel entute povas okazi en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj. La decido pri Esperanto kiel la ofciala internacia lingvo ankaŭ estas decido bazita sur praktikaj kaŭzoj por meti ĝin en centran pozicion rilate al la eksterlandaj aktivecoj.

La decido krome signifas fortan instigon al ĉiuj interesuloj mem laŭeble lerni la lingvon kaj per tio grandigi ĝian utilon por aliaj. Ĝi estas forta instigo anakŭ al ĉia ebla apogo al la klopodoj de aliaj por ankaŭ tiel vastigi ĝian utilon por la celoj de la Instituto kaj al la ĝenerala, interhoma progresigado de la monda kulturo."

Kopenhago la 5-an de aprilo 1965

Martinus	Henning Laug
Tage Edeling	Ib Schleicher

[Konsilia protokolo 05.04.1965. Vidu ankaŭ La kunlabora strukturo, par. 6.4].

Martinus pri Esperanto en 1974



En konsilia kunsido en la Instituto de Martinus la 30-an de aprilo 1974 Martinus diris:

"Mi kredas ke ni estas iom fruaj pri Esperanto, sed cetere ĝi estas bonega afero. Ĝi venos iam, kaj tio estas grandioza. Estus bone, se okazas rapide.

Sed estos Esperanto. Kiu alia povus esti? Ĉu estas aliaj lingvoj pli progresintaj?

Estas neniu lingvo same humana. Oni devas rigardi la kreinton. Li ja estis kolose humana viro. Oni preskaŭ povas vidi ke li estis taskita fari ĝin."

(*Samarbejdsstrukturen, La kunlabora strukturo*, par. 6.4).

Finevoluinta kaj perfekta internacia lingvo

La litera alfabeto enhavas 28 literojn, dum la cifera alfabeto enhavas nur 10 nombroliterojn. Martinus skribas en sia ĉefverko *Livets Bog* ke same kiel la homo evoluigis ĝis perfekteco la nombrosistemon, tiel ankaŭ la litera lingvo grade evoluos atingonte similan perfektecon. (*Livets Bog* 3 par. 1017-1051).

La homo iĝos kapabla uzi la literan lingvon en maniero same perfekta kiel ĝi nun uzas la ciferan alfabeton. Tion oni neniam ajn sukcesos per la ekzistantaj naciaj lingvoj, kiuj ĉiuj estas plenaj de malregulaĵoj kaj aliaj nelogikaj fenomenoj, kiujn oni ne povas per la matematika logiko libere kaj kree kombini al novaj sencoportaj elementoj. La lingvo perfekta devas esti planlingvo, dekomence tiel konstruita ke ĝi estas tute liberigita pri malregulaĵoj kaj maladekvataj kutimoj kaj tradicioj. Ĝi devas enhavi aron da lingvaj elementoj kun prefiksoj kaj sufiksoj, kombineblaj tiamaniere ke oni povas esprimi precize tion kion oni deziras.

Esperanto estas tia lingvo, kiu pro sia perfekte logika kaj matematika strukturo plenumas tiujn postulojn kiujn oni povus fari pri la perfekta lingvo.

Lau kosma vidpunkto *Esperanto* estas perfekta lingvo. Surfone de tiuj genieco, humaneco kaj amo al la proksimulo, kiuj subkuŝas en la kreo de *Esperanto*, tre kortuŝe estas legi la finajn vortojn de *Livets Bog* 3:

"Kiam la amo al la proksimulo povas instigi estulon kunmeti la alfabeton de la lingvo en tiajn vortojn kaj frazojn ke ili same kiel la strukturo de la cifera sistemo estigas la analizon de la universo kaj sekve de la vivo, tiam la eterna voĉo de la Diulo mem sonas senbare el ĝiaj lipoj. Tiam ĝi estas levita super la tempon kaj la spacon. Tiam ĝi harmoniiĝis kun la senfineco, la eterno kaj la ĉiopovo. Tiam ĝi estas 'la vojo, la vero kaj la vivo'." (Citaĵo de *Livets Bog* 3, par. 1051)

Esperantistoj estas denaskaj idealistoj

Laŭ Martinus la esperantistoj estas denaskaj idealistoj, ĉar li estis konvinkita ke la plimulto de la tutmondaj esperantistoj estas homoj al kiuj veraj toleremo kaj internacia sinteno estas io kunnaskita. (Erik Gerner Larsson, *Kosmos* n-ro 1/1939, paĝo 8).

Ole Therkelsen



© Martinus Institut 1981 Reg. 42

La Strukturo de la flago

DEMANDO KAJ RESPONDO

Demando: “Ni ja iam parolos la saman lingvon en la mondo. Kiu lingvo estos tiu?”

Martinus respondas:
“Esperanto! – Tiun ni parolos. Ne estas pro tio ke mi estas esperantisto, aŭ ke ĝi estas moda, sed ĉiam pli necesos ke ni havu komunan lingvon. Imagu se oni hodiaŭ havus komunan lingvon! – Tiam oni estus libera pri ĉiuj tiuj tradukoj. Ĉiuj libroj devas esti tradukataj, malofte okazas ke ili gajnas per la tradukado. Tre ofte okazas ke ili iom perdas pro la tradukado. Imagu kiom oni ŝparadus sciante unu saman lingvon. Ĉie ajn homoj povus interparoli. Tio ankaŭ kreus pacon. Nun la militaj pensoj estas grandparte kaŭzataj de tio ke oni ne povas interparoli. La interrilatado kaj la evoluo de amo estos plifaciligitaj kiam ĉiuj povos tute flue interparoli.” (Demanda leciono, Jönköping la 14-an de majo 1969).

Martinus pri internacia mondlingvo:
Vidi paĝon 13, par. 25 “Internacia mondlingvo”



La esperanta flago

SENPAGA EO-KOSMOS
Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo.

Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron.

Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

INFORMO PRI
LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento. La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo: lundo-ĵaŭdo 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen.
Kompostado: Jan Tarbensen.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.

LIBROJ EN ESPERANTO

La libroj de Martinus verkaro **La Tria Testamento** estas tradukitaj en la albana, angla, ĉeĥa, ĉina, franca, germana, hispana, hungara, islanda, itala, japana, kroata, litova, nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, serba, sveda lingvo kaj Esperanto. –

Livets Bog 1

La Eterna Mondbildo 1-4 – Libroj kiuj klarigas la simbolojn de Martinus

Logiko

Sepulto

La libretoj:

1. **La sorto de la homaro** – Pri la principoj laŭ kiuj evoluas la homaro.
2. **Pasko** – La mondhistoria pasko-evento estas analizita tiel, ke ĝi klare reliefiĝas.
3. **Kio estas la vero?** – Kun tiu fama demando kiel elirpunkto la libro montras, ke estas grave kompreni la veron de la vivo kaj akiri realan scion pri ĝi.
4. **Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio** – Tio kio instigis Martinus verki kaj la praktikaj sekvoj.
5. **La ideala nutraĵo** – La homa nutromaniero evoluas en direkto al malpli da mortigado kaj pli da humaneco.
6. **Folioj el la bildolibro de Dio** – Poezia verko, en kiu i.a. amplena priskribo de tansiro inter tago kaj nokto bele ilustras la idealan manieron de renkontiĝo inter du homoj.
7. **La idolo plej longe vivanta** – Ĝia temo estas la limigita vivkoncepto de la nuntempa homaro, kaj la grandiozo de la ĉirkaŭa naturo. La idolo plej longe vivanta estas la homo mem.
8. **La homaro kaj la mondbildo** – Traktas la homan vivon laŭ novaj vidpunktoj kaj ĵetas lumon sur malnovajn kaj novajn problemojn.
9. **Inter du mondepokoj** – Traktado de tiu tansira situacio inter primitiveco kaj humanisma vivoformo, en kiu vivas la nuntempa homaro.
10. **Kosma konscio** – Mensa suvereneco.
11. **La mistero de la preĝo** – Klariĝas la preĝon Patro Nia kaj kiel preĝado povas esti scienco.
12. **La vojo al iniciĝo** – Ĉirkaŭ miaj kosmaj analizoj. – Donacokulturo.
13. **La kristnaska evangelio** – Pri Jesuo kaj la evoluo de la homarao.